

kontakto

*tutmonda
esperantista
junulara
organizo*

N-ro 2

Volumo 3/1966

kontakto

N-ro 2
Volumo 3/1966

Revuo de Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo
(Junulara Sekcio de UEA)

Redakti internacian junularan revuon certe estas "bela afero", almenaŭ por mi. Tamen mi ne estis tro feliĉa, kiam TEJO petis min transpreni la redaktadon de ĉi tiu revuo, simple ĉar mi havas jam tiom da alia laboro, ke... Sed kial mi ripetu miajn argumentojn, se kelkaj ruzuloj de TEJO sciis refuti ilin?

Nur jen permesu al mi tuj komence eldiri koran peton: Sukceso kaj fiasko de revuo grandparte dependas ne nur de lerta kaj sperta redaktoro, sed en ne malpli alta grado de favoro kaj fervoro de la legantaro. Alivorte: devas ekesti kaj vigli dialogo inter verkantoj kaj legantoj. Kiel geedzoj baldaŭ disvivos kaj disiros, se unu el ili daŭre faras monologojn kaj la alia daŭre silentas, tiel ankaŭ baldaŭ detruigos la "feliĉo de KONTAKTO", eĉ se niaj redaktoraj monologoj estus plej allogaj.

Se ĉi tiu revuo jam tiel simbole nomiĝas KONTAKTO, ni ankaŭ havu kontakton, tamen ne nur simbolan, sed realan, korespondan. Mi havas grandan letterkeston kaj simplan adreson...

Do konigu viajn dezirojn, kritikojn, opiniojn, sugestojn kaj — verku mem artikolojn! Ni esperas ankaŭ, ke baldaŭ "forumo de legantoj" estos firma rubriko, en kiu troviĝos opini-espri-moj de gejunuloj el la tuta mondo pri la problemoj traktitaj kaj traktotaj en Kontakto. Ĉi-loke vi regule trovos babilojn de

via
Stef

zis la ne tro simpla ŝanĝo de la redakcio el Usono al Germanio. Ni klopodas baldaŭ reveni al la kutima reguleco kaj ĝisnuna akurateco.

Redaktoro: Stefan Maul, Hubertusstr. 2a, 625 Limburg/Lahn, Germanio - Desegnisto: Jan Schaap: Administrero, al kiu oni sendu ĉiujn abonkotizojn, reklamojn ktp.: Kontakto, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando - Prezo: 8 ned. gld. = 32 steloj (jarabono de minimume kvar numeroj); 2.20 ned. gld. = 9 steloj (individua numero) - Bankisto de UEA: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1, Nederlando - Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, tel. (010) 25 66 45 - Reklamtarifo: La redakcio liveros kontraŭ peto. Speciala malalta tarifo por esperantistaj entreprenoj.

La fondaĵo junulara gazeto estas oficiale fondaĵo de UEA kaj ĝia celo estas subteni la gazeton de TEJO dum la frua periodo de ĝia eldonado. Kontribuantoj oni faru rekte al UEA aŭ ties perantoj, al landaj sekcioj aŭ estraranoj de TEJO.

Manuskriptojn por Kontakto oni sendu al la redaktoro en du ekzempleroj; ili devas esti klare tajpitaj en korekta esperanto, ĉiuj supersignoj devas aperi laŭ ĝusta formo, se necese enskribitaj permane. Oni skribu sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj granda maldekstra margeno. Manuskriptojn nepetitajn la redaktoro ne devas resendi. Li havas la rajton laŭ sia bontrovo modifi artikolojn. Por la enhavo de la artikoloj respondecas nur la subskribintoj mem, kies opinioj ne nepre akordiĝas kun opinioj aŭ principoj de TEJO respektive de la redakcio.

ENHAVO

Urĝeco de naskolimigo	4
Naskolimigo kaj kat. eklezio	5
Modelfarmoj en Saldezerto	7
Unu minuto	8
Lernejo en la jaro 2000	10
Niaj humoristoj	12
Bildlibro frontvitraĵa (Aŭstrio)	13
Nia enketo	14
Letero de la Luno	15
Mozaiko	16
Bildo + Sono = Duobla ĝojo	17

NIAJ AŬTOROJ

Pri naskolimigo skribis Peter Basten, angla junulo kiu multe okupiĝis pri tiu problemo. — La *US-Artikol-Servo* liveris al ni la artikolojn sur p. 7 kaj 10/11. — La rakonton "Unu minuto" tradukis por ni enloĝanto de la urbo de la 51a UK. — *Adolf Sproeck* estas konata figuro en la germana E-movado. — La vojaĝskizon pri Aŭstrio tradukis d-ro *Klaus Perko* el "Neues Österreich" n-ro 96-6064 de 24 aprilo 1965. — La artikolon "Bildo + Sono" tradukis por ni *Heinrich Staudt*, ĉefo de la E-fako en Limburger Vereinsdruckerei/Germ., el *BASF Mitteilungen für alle Tonbandfreunde* n-ro 32.

FOTOJ

2a Germ. Televido (p. 3, 16) — WHO/FAO (p. 4) — *US-Artikol-Servo* (p. 6, 7, 10, 11)

ILI DEVUS ESTI ELEFANTOJ

du el tri homoj naskiĝas
por malsati


Tiuj elefantoj en la zoologia ĝardeno de Hamburgo fartas tre bone: ĉiutage ili estas higiene flegataj kaj nutrataj de homoj kiuj havas abundan nutraĵon ne nur por si mem sed ankaŭ por ekzotikaj bestegoj, kiuj faras al tiuj sataj homoj nenian alian servon ol amuzi la rigardantojn kaj frandi ties donacetojn.

Alie la homoj en tiuj landoj de la tero, el kiuj venis la elefantoj: ili — kvankam dutriona plimulto de la homaro — ne konas higienon kaj satecon. Ili vivas pli mizere ol iuj bestoj, ol tiuj elefantoj. Ne venas vizitantoj kun frandaĵoj al ili, kiuj eĉ pagas enrirkotizon por havi la plezuron dorloti la vizitotojn.

Kaj la infanoj de tiuj malsataj homoj naskiĝas nur por ankaŭ malsati. Sed, paradokse, ili naskiĝas amase, multe pli amase ol la infanoj de la sataj homoj. Ju pli da infanoj naskiĝas, des pli akriĝas la malsato en tiuj landoj. Ju pli granda la malsato, des pli amasiĝas la infanoj — kaj des pli rapide mortas gepatroj kaj infanoj, tamen ne sufiĉe rapide por haltigi tiun "eksplosion de loĝantaro".

Ĉu ekzistas solvo de tiu problemo, ĉu iel ni — jes, ni: vi, mi, la homaro — sukcesos rompi ĉi tiun satanan cirklon?

sm



URĜECO DE NASKLIMIGO

Kiom da homoj estas en la mondo, oni scias nur proksimume. Eĉ malpli oni scias pri la nombroj de diversaj epokoj en la pasinteco. Ciferoj por la nombro de mondloĝantoj estas, do, konjektaj. Tamen estas klara impresio de tre grava ŝanĝo en la rapideco de kresko, kiel atestas la suba tabelo:

Jaro	Homarnombro milionoj
1650	500
1850	1.000
1930	2.000
1965	3.000

Kial ĉi-tiu rapida kresko okazis? Resume oni povas diri, ke la homoj per medicino sukcesis redukti la proporcion de homoj, kiuj mortas en ĉiu jaro, sed ankoraŭ ne sukcesis sufiĉe redukti la proporcion de naskiĝoj.

Nasko kaj morto

Laŭ la Unuiĝintaj Nacioj, nur 33 % de la lastatempaj naskoj, kaj 42 % de la lastatempaj mortoj en la mondo estas registritaj. Tiuj procentoj varias de proksimume 10 % en partoj de Afriko kaj Azio ĝis preskaŭ 100 % registrado en partoj de Nord-Ameriko kaj Eŭropo. Tamen, uzante la haveblajn informojn, la statistikistoj de U.N. preparis tabelojn de naskiĝ- kaj mortprocentoj en diversaj landoj. Jen malgranda elĉerpajo.

Lando	Naskiĝoj dum		Mortoj dum	
	1940 ‰	1960 ‰	1940 ‰	1960 ‰
Cejlono	3,6	3,7	2,1	0,9
Ĉilio	3,3	3,5	2,2	1,2

Oni tuj rimarkas, ke dum okazis preskaŭ duoniĝo de la mortprocento, la naskiĝprocento restis sama, eĉ pli-grandiĝis. Se ne okazas migrado, la diferenco inter la naskiĝprocento kaj la mortprocento mezuras la kreskon de la loĝantaro. Se io, inkluzive de loĝantaro, kreskas je $2\frac{1}{2}$ ‰ jare, ĝi duobliĝas post 30 jaroj.

Demografia revolucio

Dum la pasintaj ducent jaroj la eŭropanoj ĝuis la rezultojn de kolonioj, disvastiĝo de komerco, teknikaj pliboniĝoj en agrikulturo kaj industrio, kaj limigo de malsano per higieno kaj medicino. La eŭropa mortprocento rapide falis, kaj en la 18-a kaj 19-a jarcentoj rapide kreskis la nombro de eŭropdevenaj mondloĝantoj. Tiu rapida kresko ne daŭris senlime, ĉar la eŭropanoj trovis rimedojn por limigi la nombrojn de naskoj.

Tiun ŝanĝon, de relative granda naskiĝprocento, akompanata de relative granda mortprocento, al relative malgranda mortprocento akompanata de relative malgranda naskiĝprocento, oni kelkfoje nomas la demografia revolucio.



Sed nur triono de la mondloĝantaro partoprenis tiun revolucion. Je la komenco de la nuna jarcento la popoloj de Afriko, Azio, kaj Sud-Ameriko havis naskiĝprocenton ĉirkaŭ 4% kaj la mortprocento estis nur malmulte malpli. Tamen dum la 20-a jarcento la scienca scio kaj teknika lerteco de la alia triono de la mondo kontribuis al grava redukto de la mortprocento en tiuj kontinentoj, ankoraŭ ne akompanata de simila redukto de la naskiĝprocento. Rezulte okazas kresko de la homarnombro sen precedenco en la homa historio.

Problemo de nutrado

Antaŭnelonge Oxfam (brita organizaĵo por helpi malsatulojn) decidis doni financan subtenon al nasklimigaj kampanjoj. En la 1965-printempa bulteno de Oxfam aperis artikolo pri tiu decido, el kiuj la sekvantaj frazoj estas cititaj. "La raporto de FAO "La stato de nutraro kaj agrikulturo 1964" montras, ke dum la pasintaj kvin jaroj la monda nutraĵproduktado kreskis ne pli rapide ol la kresko de la homarnombro, proksimume 2% jare. En kelkaj evoluantaj landoj, kie la bezono estas plej granda, la kresko de nutraĵproduktado estis eĉ pli malrapida. Estas preskaŭ nenia margeno por plibonigo de nutraĵ- kaj vivkondiĉoj, kio estas tre urĝe bezonata... En Hindio la kvanto de greno por ĉiu persono, inkluzive grandskalajn importaĵojn, ne pligrandigis post 1961..."

Tiuj, kiuj argumentas, ke nasklimigo estas nedezirinda, ĝenerale ankaŭ argumentas, ke oni troigas la problemojn, ke nunaj kaj estontaj kreskoj de nombroj ne estas preter la nutraĵproduktokapabloj, aŭ ke la pliprandiĝo de nombroj aŭtomate malakceligos, kiam la ekonomiaj cirkonstancoj plibonigos. Ĉi-tiuj argumentoj estas bazitaj sur fantaziaĵoj. Kiel mi notis supre, nutraĵproduktado apenaŭ atingas la nunan nombrokreskon, kaj la nuna nombrokresko estas modesta, kompare al tio, kion ĝi atingos, se ne regita."

Nasklimiga kampanjo

La unua nasklimiga projekto de Oxfam estas en Koreo. La nombro en Suda Koreo, proksimume 27 milionoj, kreskas je 3% jare. Registara kampanjo, kiu komenciĝis en 1961, celas redukton

al 2,5% en 1966 kaj 1,8% en 1971. La kontraŭkoncipilo ĉefe uzata estas enutera ilo plasta. Oni esperas, ke en 1967 ĉi-tiu liberigos kvaronon de koreaj virinoj de nedeziritaj gravediĝoj. Oni enkondukas la programon per 189 klinikoj, ĉiu el kiuj rilatas al 100.000 ĝis 200.000 homoj. Ĉiu kliniko havas tri deĵorantojn. Oxfam donacis proksimume 20.000 usonajn dolarojn por subteni dum unu jaro du klinikojn ĉe hospitaloj en Seoul.

Abortigo

Kie ekzistas forta motivo por nasklimigo, kaj efikaj rimedoj ne estas haveblaj, la ĝenerala rezulto estas ke granda nombro da virinoj mortas post la servoj de la flankstrataj abortigistoj. El Ĉilio estas raportite, ke flankstrataj abortigoj okazis post 35-40% de ĉiuj gravediĝoj, kaj ke 40% de patrinmortoj estas kaŭzitaj per abortigo.

En 1948 la registaro de Japanio enkondukis leĝon, per kiu ĝi faciligis steriligon kaj abortigon. La ŝtato ebligas tion en kazoj, kie ekzistas medicinaj kialoj por naskmalebligo. En la sekvinta jaro oni aldonis ekonomiajn cirkonstancojn al tiuj kialoj. La oficiala prezo por abortigo estis proksimume kvin usonaj dolaroj, sed pro asekurplanoj kaj sanservoj oni ofte pagis malpli ol unu dolaron. Jam en 1953 ekzistis 700 klinikoj. En tiu jaro oni oficiale raportis pli ol unu milionon da abortoj, kaj se oni aldonas la neraportitajn, la cifero probable superas du milionojn. Tio estas egala al la nombro de naskiĝoj.

Urĝa tasko por U.N.

Registaroj jam kampanjas por nasklimigo per steriligo kaj abortigo. Tamen nuntempe ekzistas rimedoj, kiuj ebligas nasklimigon sen vivdetruo. Precipe taŭgaj por la evoluantaj landoj ŝajnas novaj enuteraĵoj, kiujn landoj kiel Usono povas malmultekoste kaj grand-skale produkti.

Tiuj povus liberigi virinojn en la evoluantaj landoj el la stato de naskmalebligo, kiuj produktas infanojn nedeziritajn, por kiuj la mondo proponas nenion krom malriĉo kaj mizero. Sed la skalo de la problemo estas tiel granda, ke oni povas trakti ĝin nur kiel mondan problemon. Jen urĝa tasko por U.N. Peter Basten

ĉio. Ĝi koncernas la teologion nur laŭ morala pravigo de maniero kaj metodo, kaj eventuale laŭ baza rajto limigi naskadon. Sed ĉi-lastan oni povas dedukti nur el t.n. natur-juro, do etiko kaj sociologio. La biblio fakte kontribuas nur ege magre al seksetiko.

Influo de Aŭgusteno

Se ni ĵetas mallongan rigardon al la moralteologia historio, ni devas konfesi, ke dum preskaŭ 2000 jaroj la seksmoralo en la katolika teologio estis influita de Aŭgusteno (ekleziata patro, 354-430). Sed li bazas sur malĝustaj biologiaj imagoj, opiniante ke volupto kaj libido estas sub kontrolo de volo. Li ja ne sciis ke la homo havas du diferencajn nervosistemojn kaj ke al la dua, la vegetativa, apartenas seksaj agoj. Kun nia hodiaŭa biologia scio li estus konkludinta tute alie.

Aŭgusteno mem evoluis dum sia vivo de sekspesimismo al seks-neŭtraleco, nome li fine instruis ke geedza sekseco estas en si bona laŭ la spirita amo (li estis forte influita de la stoika idealo de senpasio), sed malbona (t.e. peka!) en la karna unuigo, kiu sekve de la origina peko perdis siajn paradizajn bonecojn.

Tiel li do konkludis ke la karna unuigo de geedzoj strikte nur tiam estas bona kaj ĉasta ago, se la gepatroj **volas generi**. En tiu kazo li ankaŭ **toleras** volupton kaj libidon. Volupto sola, izolita de gener-volo, estas peko.

Preskaŭ same instruas ankoraŭ **Tomo de Akvino** kun la tuta mezepoko.

Postmezepoka evoluo

Nur en la frua 16a jc. venas nova faktoro en la katolikan moralteologion per du francaj teologoj (unu el ili estis Johannes Maior), kiuj instruas ke geedza seksunuigo "voluptis causa" estas senpeka. Oni akre kritikis ilin, sed du jarcentojn poste ilia opinio venkis. En la 17a jc. hispana teologo Basilius Pontius akcentas la **strukturen** de la seksago neglektante la ĝis nun emfazitan **motivon**. Li do venas al pozitiva agmoralo.

Sur tiu ŝtupo staras ankoraŭ la fama encikliko Casti Connubii de Pio XI (1930). Intertempe la evoluo transiris la instruojn de tiu encikliko: de pozitiva agmoralo oni venis al pozitiva **edzetiko**.

Person-aspekto

Nome oni nun emfazas la dum 2000 jaroj neglektitan aspekton de la personeca geedza amo: laŭ la 2a Vatik. K. en la seksunuiga ago tiu geedza amo ne nur estas "finis operantis" (celo de l' agantoj) sed "finis operis" (celo de l' ago). Tiu difino nu ne estas eltrovo de la koncilo, sed rezulto de jam jarojn antaŭe farita laboro de moralteologoj.

La du aspektoj aŭ sencoj de la seksunuigo do estas nun laŭ katolika instruo: **amo** kaj **genero**, kiujn oni ne povas arbitre disigi, kiuj ne staras unu

Fruktu kaj multiĝu

Nasklimigo kaj katolika eklezio

Sendube unu el la plej eminentaj kontraŭantoj de nasklimigo estas la romkatolika eklezio, kvankam ĝi ne simple neas la problemon aŭ la neceson solvi ĝin, nek simple rifuzas ĉiel naskolimigadon. Kion ĝi kritikis aŭ kontraŭbatalas, estas parte la metodoj parte la principoj, sur kiuj bazas la moderna naskolimigo. Aliflanke estas tre malfacile, skizi la sintenon de la katolika eklezio, jen ĉar interne de ĝi la diskutado daŭras kaj konas tre diverĝajn opiniojn, jen ĉar la 2a Vatikana Koncilo ne faris apartan eldiron en tiu rilato sed lasis la ellaboron de nova teologia deklaro al papa komisiono, kiu

ĝis la tago de mia nun verkata artikolo ne montris iajn rezultojn.

En tiu komisiono membras ne nur teologoj, sed fakuloj el ĉiuj koncernitaj sciencoj, ĉefe do medicinistoj kaj sociologoj. Mankas, cetere, ankaŭ aliaj kompetentaj voĉoj pri la tuta problemaro, tiel ke en mia skiza studeto mi nur povas limigi al la pura moralteologio, kaj tie ankaŭ limigas min al la lasttempa evoluo.

Farante tion, ni devas ne pretervidi unu gravan aspekton: El pure teologia argumentado mem oni nenion povas diri pri ekz. naskolimigo, ĉar tiun problemon ne konas biblio kaj tradi-

apud alia, sed kunplektiĝas al unu intima tuto.

Tio tamen ne signifas, ke seksago sen genermotivo estas malbona aŭ peka. Temas pri principoj validaj por la metafizika ekzistado de la persono, ne por la biologia sfero. Tial ekz. laŭ la moral-teologo Klomps (Bonn/Germ.) ia rekta influo al la biologia procezo ne el si mem estas malbona. Kion oni rifuzas, estas influo per mekanikaj iloj, ĉar ili vundas la naturecon de la seksago. (Sed ankaŭ tion oni diskutas.)

Aliflanke — sen nun rezoni pri la medicina aspekto — oni ne simple rifuzas la t.n. kontraŭbeban pilolon, medikamenton hormonajan. Sendepende la nederlanda teologo Janssen (Leuven) kaj la germana episkopo Reuss (Mainz) venis al la konkludo, ke aplikado de tiu pilolo kaj la konata (kaj ofte ridindigita) Knaus-Ogino-metodo (perioda nefekundeco, science preskaŭ kontestita) kuŝas sur la sama ebena, kaj tiel do ambaŭ estas permeseblaj pro gravaj kaŭzoj, al kiuj apartenas ekz. ekonomiaj konsideroj. Reuss eĉ iras paŝon plue kaj postulas ĝian aplikon, se la intereso de la geedzaj bono kaj feliĉo postulas ĝin.

Kio nun koncernas mekanikajn ilojn por eviti gravediĝon, kelkaj modernaj teologoj serioze demandas, ĉu ili mem el pure fenomenologia vidpunkto povas diri ion, ĉar ili ja vivas celibate kaj tial neniel travivas seksan situacion. Al tio montras ankaŭ la fakto, ke en la supre menciita komisiono troviĝis laikoj kaj edzoj.

Fine restas la demando, ĉu entute biologia procezo legitime povas normigi la metafizikan, personecan agon.

Baldaŭa decido necesas

Oni do vidas, kvankam mankas ĝis nun kompetenta deklaro de la oficiala eklezio pri la problemoj de naskolimigo: la katolika eklezio ne meritas la riproĉon fermi la okulojn antaŭ la problemoj, ja male ĝi estas la sola moral-etika instanco kiu okupiĝas pri ili, kaj kiel ŝajnas, venos en baldaŭa estonteco al konkretaj rezultoj, dum nenie en la vasta kampo de la ĝenerala etiko troviĝas eĉ nur unu kvalifikita eldiro pri tiuj problemoj.

Ke la eklezio nur nun aliras tiun problemaron kaj ke antaŭe ĝi limigis sian geedz-moralecon al genera aspekto, estas ankaŭ sekvo de la historia situacio, ĉar ekz. en la mezepoko — pro netaŭga medicino, pro militoj ktp. — estis ekzistoproblemo de la homaro havi kiom eble multajn infanojn, dum hodiaŭ estas inverse. Aliflanke la rezervemo de la katolika moralo progresigis ankaŭ la medicinon, tiel ke kaŭze de la strikta malpermeso de abortigo ekz. la kranio-tomio hodiaŭ apartenas jam al la medicina historio.

Stefan Maul



MODELFARMOJ EN SALDEZERTO

Giganta agrikultura eksperimento

Imperial Valley en Kalifornio estas ekzemplo por ĉiuj popoloj, kiuj devas gajni panon por multaj malsataj homoj el nefekunda tero. Ĉi tie oni montris kiel krei el dezertoj florantajn ĝardenojn.

Oni regulis riverojn, konstruis digojn kaj akvum-sistemojn ktp. Imperial Valley estis sekega salvalo, 90 m sub la marnivelo. Dum unu jaro falas malpli ol 75 mm da pluvo. Bufoj kaj kreosot-arbustoj estis la solaj vivaĵoj. Cento da homoj soif-mortis vojaĝante tra la saldunoj de tiu regiono.


Sed jam antaŭ cent jaroj vasthorizontaj farmistoj ekkonis la eblecojn de la valo. Ĉar dum jarmilionoj la giganta riverego Colorado portadis fekundan humon en la saldezerton kaj per inundoj estiĝis dika humtavolo.

La dezert-klimato estis favora por legomo kaj fruktoj. Problemo estis nur la akvumado. Sed la riverego ja alportis akvamasojn, la regiono

estas dekliveta ĝis la Saltonlago (90 m sub marnivelo) kaj tiel taŭga por vasta kanal-sistemo. En la jaro 1901 estiĝis la unua kanalo — hodiaŭ estas reto kun suma longeco de 2700 km! La farmistoj simple mendas la bezonatan akvon telefone en la centro: "Ĉi tie Mari-gold-kanalo, kluzo 30. Mi bezonas morgaŭ matene 10 second-feet da akvo." Kaj aŭtomate je la indikita tempo fluos la dezirita akvoamaso. Alia grava kaj pli malfacila problemo estis la salo, estiĝanta daŭre pro la konstanta vaporiĝo kaj restanta en la tero. Oni solvis ankaŭ tiun problemon. Al la surteraj korespondas subteraj kanaloj, kiuj forfluigas la salon al la lago.



La All-American Canal (*mald. supre*) ricevas sian akvon el la Colorado-rivero. - Gigantaj melon-kampoj (*mald. sube*) kaj belegaj daktil-palmoj (*supre*) estas la rezultoj de tiu grandioza eksperimento. - Je ambaŭ flankoj de la Imperial-digo estas grandaj basenoj, en kiuj la Colorado-akvo estas purigata antaŭ la plufuado en la kanalojn (*sube*).



De tempo al tempo kaptas min la sopiro, verdire ĝi ekposedas min, por ke mi ŝiriĝu el la rulbrulego de la grandurbo kaj iru ien, kie estas silento kaj trankvilo.

Mi iras al la supraĵo sur la ŝtuparo ĉe la Gellért-statuo, por momento ek-ekhaltas ĉe la ripozejoj kaj admiras la pejzaĝon, la Danubon sube fluantan, super ĝi la pontojn, kiuj svelte traarkas ĝin...

Mi jam atingis la promenejon de la Citadelo kaj de tie mi rigardas, plezuras en la pejzaĝo, enspiras la puran aeron. La herboj, arbustoj, floroj verŝas el si la odoron, kiel giganta fabriko, kiu ne produktas alian, nur odoron, pro tio, ke la homoj ĝuu ĝin, por narkotigi ilin.

Ĉi tie kaj tie homoj sidas kaj admiras la urbon en fumo kovriĝintan, kiu iom mallume disvolviĝas sub la blua ĉielo.

Mi eksidas sur iun benkon. Baldaŭ blankharulino okupas lokon apud mi. Dum iom da tempa ŝi admiras la malnovajn ŝtonojn de la Citadelo, poste malrapide ŝi malfermas sian plastsaketon, manlaboraĵon ŝi elprenas kaj komencas kroĉeti.

Gajaj infanoj marŝas antaŭ ni, laŭte ili kantas, tiel ke eĥas la regiono. Blankmantela sekstatura virino de tempo al tempo ekhaltas kaj rapidigas la forrestintojn post la aliajn.

La manoj de la virino ekhaltas kaj ŝi rigardas, rigardas longe la malproksimiĝantajn infanojn. Aeroplano flugas super ni kun akra muĝado, tiel, ke la benko ektemas. Mi sentas, ke la virino ektemetas sur la benko kaj poste profunde ĝemas.

— Ĉu vi ne timas? — mi demandis. Ŝi levas al mi siajn grandajn, grizajn okulojn, denove profunde ŝi ĝemis:

— Sed jes...

— Nur malofte ili flugas ĉi tie.

— Mi ne ŝatas ilin. Ĉiam ĝi vekas la pasinton en mi.

— Ĉu la pasinton?

— Jes...

— Ĉu vi havas malbonajn rememorojn?

— Bedaŭrinde, jes.

Instinkte ni tiriĝis pli proksimen unu al la alia. Mi pensis, ke ŝi farbigas sian hararon — kiel estas kutime nuntempe —, sed ĝi decis al ŝia vizaĝo, kvankam ŝi jam ne estis juna. Mi eĉ ne povis imagi, kiel aĝa ŝi estas, ja sufiĉe bone ŝi tenis sin. Mi provis meti la demandon, kio estas tiu malbona rememoro, kion tiel ĝeme ŝi diris.

Ŝi rigardis al mi kaj tiel komencis:

— Kvankam mi ne ŝatas okupiĝi pri ĝi, prefere mi provas forgesi, sed kiel ajn mi volas, mi ne kapablas, ĉar denove kaj denove relumas la tago en mi, kiam

ni iris malsupren en la kelon, ĉar supre jam estis neelteneble. Jam ankaŭ niaj nervoj preskaŭ malfunkciigis... Mia edzo — kiu estis inĝeniero — konvinkis min: nun jam ni devas iri malsupren. Mi havis filinon 18-jaran, havintan grandajn blujajn okulojn, belege ondan hararon, ŝi estis antaŭ abiturienta ekzameno.

— Ni pasigis jam tri semajnojn en la kelo, ĉion ni konsumis jam, eĉ la fabo havis oran valoron. De tempo al tempo ĉesis la bruoj, la homoj kuraĝis elveni, kaj tranĉis pecon el la ĉevalo falinta sur la strato, el tiu fariĝis la festotaga tagmanĝaĵo. Pro tio mi diras, ke festotaga, ĉar tiam ĝi tiom signifis. Multope ni amasiĝis en la ŝirmejo, unu apud la alia. Ankaŭ akvon nur malofte ni havis, por ke almenaŭ ni estus povintaj lavi nin, sed fiodoro... ĝi estis abunda.

— Mia edzo estis silentema homo, neniam li partoprenis en la konversacioj. Vi scias, kiel estis tiam, la opinioj estis diversaj. Iu pri tio, alia pri alia okazaĵo havis esperon, estis tiaj, kiuj eĉ laŭte publikigis ĝin. Aliaj nur silentis, sed estis inter ni senpovaj malsanuloj, maljunuloj, kio malbone efikis al ni. Mia filino ĉiam tiriĝis al mi. "Kara panjo, nur foje finiĝu tiu ĉi teruraĵo! Neniam mi estos malkontenta!" Kvankam ŝi ne estis malkontenta. Nuntempe oni diras: kie estas nur unu infano, tie estas malfacilaĵo, ĉar ili estas postulemaj, kaj iom eĉ impertinentaj. Mia filino estis nek impertinenta, nek postulema. Ŝi vivis nur por la lernado. Same ŝi amis nin ambaŭ, ŝi preferis nek sian patron, nek sian patrinon. Estas vere, ke elinter ni neniu klopodis ŝin prefere ligi al si. — Ŝi iradis por instrui al ŝiaj pli malfortaj samlerneĵanoj, ŝi kolektis la ricevitajn monojn kaj jen al mi, jen al sia patro ŝi afablis per ia donaco. Kvankam mi ne estus devinta tion fari, regule ŝi ricevis poŝmonon. Ofte ankaŭ ĝin ŝi ŝparis. Ŝi havis ĉion, ĉiun ŝian deziron ni plenumis, sed ni atentis, ke ŝi vidu ĝian valoron. Neniam estis malfacilaĵo. Bele ŝi pianludis, mi sidis kaj fiere aŭskultis ŝin.

— Nu, sed mi ne volas rakonti ŝian tutan infanaĝon, aŭ la vivon de ni ambaŭ. Mi estas gimnazia profesoro. Ankaŭ miajn instruojn tiel mi edukas, ke ili iĝu simplaj, solidaj homoj. Ili ne estu egoistaj, sciigu, ke ili vivas en granda komuneco.

— Iun nebulan decembran tagon mi rememoris en la ŝirmejo, ke ie en la manĝajnkamero, malantaŭ la boteloj mi havas iom da fabo, mi supreniros. Estis silento, ankaŭ malsupre ĉiu silentis, kaj tiam mi decidis, ke mi kurois el ĝi bonan legomom. Mia edzo kaj filino petis min: ne iru, sed mi vidis, ke ili suferas pro malsato, mi ne plu povis elteni. Mi iris supren, kvankam mia kara filino alkroĉis sin al mi: "Ne, mia

minuto

panjo, vi iras nenien. Vi vidas, ke neniu movas sin.” Sed mi zorgis pri nenio, dirinte, ke baldaŭ mi estos denove ĉi tie.

— Malfacile, sed tamen mi trovis, eĉ mi ne selektis ĝin. En iu sitelo mi trovis iom da akvo, tiel senlavite mi metis ĝin por kuiri. Tiel mirindan odoron de la fabo neniam mi sentis, kiel tiam. La strato estis trankvila. De tempo al tempo mi iris al la fenestro, sed mi ne povis bone travidi, ĉar la kadroj estis kovritaj per papero, ankaŭ tiuj ĉifoniĝis, ĉar la aerpremo deŝiris ilin. Fantome ili ektintis, sed dum la semajnoj de la sieĝo al multaj okazaĵoj ni alkuti-miĝis, mi do ne timis. Mi metadis en la kuirejo, trairis en la ĉambroj, ĉu estas ĉio sur sia loko, ĉu ne estis iu fremdulo en la loĝejo? Okazis, ke se de tempo al tempo oni supreniris en la loĝejon, povis konstati, ke jen tio, jen alia mankis. Mi rimarkis nenion. Subite suprenkuris mia filineto. Mi riproĉis ŝin: — Tuj reiru, baldaŭ estos preta la legomo kaj mi portos. — Malfacile mi povis resendi ŝin, ankoraŭ el la pordo de la kelo ŝi rekriadis:

— Ne restu longe, panjo, ĉar tiam ni ambaŭ supreniros. — Ne, ne, mi respondis, kiam ĝi estos preta, tuj mi iros. — Iom mi purigis, aranĝis en la loĝejo, ĉio estis kovrita per fulgo, polvo, kaj mi, kiu ŝatis la purecon, la ordon, mi ne povis tion rigardi.

— Iom poste mia edzo kriadis al mi, lasu tiun aĉan fabon, ili ja ne manĝos, nur mi iru malsupren. Ĝi ne finkuiriĝis ankoraŭ, kelkaj pecoj krakis, sed ĉar mia edzo denove maltrankviladis, li volis suprenveni, post duonhoro mi kunpakis manĝilaron, ankaŭ pecon da pano, por ke mi malsupreniru. La ŝirmejo estis ĝuste sub ni. Mi iris malsupren sur la ŝtuparo, mi jam atingis la teretaĝon, preskaŭ mi estas ĉe la pordo de la kelo, kiam aŭdiĝis terura eksplodo, poste tintego, polvo. Por momento al la tero radikigiĝis miaj piedoj, verdire mi sufokiĝadis, mia buŝo kaj okuloj pleniĝis per polvo. Tra la ruboj mi mispaŝadis al la pordo de la kelo kaj kriadis:

— Géza... Géza... Mia Evo... Mia Eveto... Ankaŭ la irejo malsupren pleniĝis per ruboj, preskaŭ kvarpiede mi atingis la kelon, kaj malsupre, ĉe la ŝtupo kuŝis sterniĝe mia filineto. Nigra ŝi estis pro fulgo kaj polvo. Mi ne scias, kiel mi forĵetis la poton, en kiu estis la manĝaĵo, nur tiregis la malfeliĉan, tra la ruboj. Ĉe la ĉefŝtuparejo mi demetis ŝin, kaj iris en la straton, por kriadi. Venis ja kelkaj homoj, ili faris portilon el latoj kaj lignotabuloj kaj tiel malsupre, kiel mi estis, ni portis ŝin en la klinikon: Survoje ofte ni tiriĝis malantaŭ la pordegojn, ĉar oni pafadis. Mi ne scias, kiom da tempo pasis, ĝis ni atingis la klinikon. Iuloke ne estis akvo, aliloke ne estis elektro. Portadis ni ŝin el unu hospitalo en la

alian, ĝis fine ni povis ŝin lokigi. La kelo de la hospitalo estis plena de vunditoj, malsanuloj, sed tiom mi petegis, ke oni ekkomencis la operacion ĉe kandellumo. Sed oni ne povis fini, apenaŭ ili ekkomencis, denove venis la maŝinoj. Tie ŝi mortis...

— Mi rapidegis reen, sed nia ŝirmejo plentrafiĝis, jam de la strato mi vidis, ke tie estas fantoma malpleno. Tiam mi konsterniĝis: ankaŭ mia edzo mortis. Tamen ĉion mi traserĉadis. Jam estis sangmakulaj miaj fingroj, miaj ungoj rompiĝis. Mi trovis nenion. Mian saketon neniam mi forlasis, en ĝi estis ja niaj valoraĵoj. Mi kuregis al la enteriga entrepreno por aĉeti ĉerkon. Eĉ tion mi jam ne scias, kiom mi pagis por ĝi. Mi nur erarvagadis en la urbo. Se estis silento, denove kaj denove mi iris kaj serĉis mian edzon. Tiam mia hararo blankiĝis.

— Alitage, kiam mi reiris al la kliniko, oni sciigis al mi, ke mian filineton oni jam enterigis en la Herboĝardeno, en komunan tombon. Mi kredas, ke eĉ pensadi mi ne povis.

— Kiam finiĝis la bataloj, en la ĉirkaŭaĵo oni elfosis la tombojn. Ĉie mi serĉis ilin. Tiun ĉerkon, kiun por mia filineto mi elpagis, mi rekonis: kiam oni malfermis ĝin, mi ektimiĝis: nekonata viro kuŝis en ĝi.

— Nun sola mi estas, dum unu minuto mi perdis ĉion. Mi perdis ĉiujn, kiujn mi amis, kun kiuj mi estis unu, kaj ili ankaŭ estis unu kun mi. Ĉu nun jam vi komprenas, kial mi ektemas, se maŝino flugas super mi? Ĝi vekas la teruron en mi.

— Tiun teruran minuton, kiam mi trovis nur erojn el miaj mebloj, kaj ĉifonetojn el la vestaĵoj de miaj amataj. Pro tio mi abomenas la kruelecon, kiu puŝis min en la solecon. Mi ŝatus ŝiri el la koro, animo de la homoj la malbonecon, venĝon, malamon, koleron, envion, monavidon, ĉion, kio estas malbona, kio povas amarigi la animon de la homo, kaj planti amon, interkomprenon, pacon, diligentecon. Diligentecon, kiu deponas la pratempoj denove kaj denove suprenlevas la homon. Ĝi pleniĝas liajn koron kaj animon kun kredo, espero, por ke regu nur la bono, la malbono pereigu desur la tero.

— Nun mi loĝas kune kun mia fratino, bone ni komprenas unu al alian, sed miaj amataj... ili ne estas plu. Mi ŝtatus krii en la mondon, por ke ĉiu aŭdu sur la tero: Homoj! Neniam plu!

— Pardonu al mi, ĉar ĉion ĉi mi rakontis.

Ne plu ŝi parolis, silente ŝi daŭrigis la kroĉetadon. Belvestita, alta, blonda knabino paŝadis antaŭ la benko, kun libro en sia mano. Laŭte ŝi diris la tekston de la libro, estis evidente, ke ŝi lernas. La maljunulino levis al ŝi sian rigardon kaj kiel la knabino malproksimiĝis, prenis sian poŝtukon kaj viŝis siajn okulojn.



LERNEJO EN LA JARO 2000

Kulturcentro por 250 000 homoj

Kiel aspektos la morgaŭa lernejo, kiel tiu de la jaro 2000? Tion respondas ĉi tiuj du bildoj, modeloj montritaj dum la Novjorka Mond-ekspozicio.


Estas lernejo de tute nova tipo, kvankam kelkaj el ĝiaj elementoj estas aplikataj jam nun. Sed jen oni proponas kompaktan kulturcentron por urbo kun 250 000 enloĝantoj. Ĝi unuigas ĉiujn lernejojn de elementa ĝis universitata kaj ĉiujn aliajn kulturejojn — bibliotekojn, studejojn, muzeojn,

koncert-halojn, ekspoziciejojn, sportejojn, teatrojn, distrejojn ktp. Tri kolonspecaj turoj, ĝis 150 m altaj, staras sur multparta teretaĝa bazo, kies diametro estas 240 m. En la teretaĝo troviĝas la komunaj ejoj, dum la turojn plenumas la tri kulturbranĉoj beletro, naturscienco kaj spiritscienco.



Parte la ĉambroj kaj salonoj estas senfenestraj por garantii nepran koncentriĝon de lernantoj, kiuj dum la paŭzoj povas refreŝiĝi sur balkonoj kaj terasoj. Sur la tegmento de la teretaĝa komplekso troviĝas specialaj instalaĵoj, kiel "demonstra kaj eksperimenta centro" por registrado de bild-kaj aŭd-programoj. Filmoj kaj sonbendoj estas arkivitaj en elektrona centro, kiu samtempe funkcias kiel lernbiblioteko kaj fulmrapide disponigas — helpe de magnetbendoj — la lernmaterialon rekte al la koncerna ĉambro. Parte la instruisto do instruas de ŝalttablo, kiel montras la alia bildo. Kontrolaŭtoma-

toj reguligas klimaton, koloron, lumon kaj sonon en la unuopaj ĉambroj, kiuj estas absolute bruizolitaj, kies meblaro estas celkonforma kaj komforta. La idealaj lumkondiĉoj ne lacigas la okulojn, ankaŭ la akustiko estas perfekta. Kaj kompreneble ne ekzistas tro plenaj klasĉambroj. "Eklerneja centro" faciligas al la 3-7-jaraj infanoj la transiron de hejmo al la pli granda lerneja komuno. La lernejo de morgaŭ instruos la homojn dum ilia tuta vivo, ĉar ili ja ne laboros tiel multe kiel hodiaŭ. Cetere: miniatur-klasĉambro kun similaj ekipaĵoj kiel la lerneja havos ĉiu lernanto hejme.



ELEKTRA

Hieraŭ mi vizitis la operon. "Elektra" staris sur la programo; de Strauss. "Ha," mi pensis, "bonege." Sed estis tenebra afero. Tiu Elektra nigrevestita, ĉifonita veste kaj spirite lamentadis pro la murdita patro. Venis sur la scenejon ŝia fratino, la pli juna. Sed ŝi estis aplomba virino, granda, larĝa laŭ ĉiuj direktoj. Ŝi ne ŝatis lamentadi kune kun la fratino. Ŝi diris: "For estas for, mi volas vivi mian dolĉan vivon." Sed la patrino ne permesis tion. Ŝi la du fratinojn tenis malliberaj. Kaj Elektra kovis, kovis tion, kion nur homo povas kovi: Venĝon. Kaj la patrino sciis tion. Tial ŝi zorgis, ke la fratinoj ne povu libere agi.

Nun la patrino aliras le scenejon, Klitemnestra, la pompa, la bela, riĉe ornamita sur la tuta korpo per juveloj. Ŝi, la reĝino. Nu ja, ŝi murdis la edzon, por povi ĝui la amatan, belan Egiston. Aŭ tiu murdis lin, por povi ĝui ŝin. Ĉiukaze Elektra malamas ambaŭ nomante ilin gemurdintoj. Klitemnestra ne fartas bone. Ŝi havas songojn premegajn. Ne pro la murdo, kiun ŝi certe ne pentas, ŝi ja havas la pli belan Egiston. Estas io minesciaskio, la timego pri Oresto, ŝia filo nun forestanta pro vojaĝo, pri Elektra, pri ambaŭ, kiuj eble ne povas forgesi la murditan patron (sed ŝajnas, ke Oresto ne jam scias pri la murdo), kiuj eble intencas venĝon.

Elektra sciiĝas pri la morto de Oresto. Li estis la unuavica venĝonto. Li mortis, nun ŝi, Elektra devis plenumi la rolon de venĝanto. Ŝia fratino devus helpi al ŝi. Sed tiu, la bela Chrysothemis sopiris dolĉan vivon, amon, edzon, sed ne venĝon. Ŝi estis preta, paciĝi kun la patrino por atingi la liberecon. Do Elektra decidiĝis, agi sola. Ŝi elfosis la hakilon, la instrumenton, per kiu Agamemnono, ŝia patro estis murdita. Ŝi volis fari hakviandon el Klitemnestro kaj Egisto.

En tiu momento viro suriras la scenejon. Unue li kantas pri la mortinta Oresto, poste klarigas, ke li mem estas tiu Oresto, videble do ne mortinta. Elektra alkantas lin: "Orest', Orest', Oresto!" Ĝis fine, fine li rimarkas, ke kantas la fratino, ke kantas Elektra. Iom rigida, severa, opera brakumo — kaj li faras sian devon. El la domo oni aŭdas la vekriojn de la mortigata patrino.

Venas Egisto, iom orgojla sinjoro, kiu insultas la sur la scenejo laborantaj servistinojn pro maldiligento. Li aŭdis pri morto de Oresto, volas havi certecon. Elektra klarigas al li, ke en la domo estas du viroj, kiuj alportis certan raporton. Ŝi afable petas lin, eniri la domon.

En ĝi ja estis — tion ŝi ne rakontis — Oresto kun sia amiko, pretaj al dua venĝa murdo. Oni ne klare sciiĝas, ĉu vere okazis tiu murdo, ĉar la orkestro en tiu grava momento estis tro laŭta. Sed tre verŝajne okazis tiu murdo, ĉar subite Elektra komencas prezenti ĝojdancon. Estas miksaĵo de valso kaj tvisto, speco de venĝorgio superfluanta de ĝojego.

Fino estis: Kaj la publiko aplaudiis, aplaŭdegis, ke de la gekantistoj elvenis por riverenci danke. Kaj vidu! Ankaŭ Egisto elvenis. Li do ne estis mortigita, almenaŭ ne tute. Kaj ankaŭ Klitemnestra ekstaris de sia mortolito por akcepti aplaŭdojn bonmeritajn. Ŝi vere estis kantinta belege.

Poste mi komprenis, kial ambaŭ gemurdintoj ne estis gemurditoj. En proksima semajno oni denove prezentos "Elektra". Kaj la ĉiujfoja foruzo de la ĉefaj gekantistoj estus tro multekosta por la direkcio.

Elirante mi denove rigardis en la programon kaj rimarkis, ke la komponisto estas Richard Strauss, ne Johann Strauss. Pro tio tiu stranga muziko...

BILDLIBRO FRONTVITRAJA

en Aŭstrio penindas halti kaj memori pri tagoj pasintaj

De OTTO STRADAL

Larĝe devolviĝas la asfalta rubando de la ŝoseo. Unutone zumadas nia motoro, kaj nur la kelkfoja delikata grincado aŭ ioma kraketado de suprenkirlita sablo aŭ de nove surmakadamitaj ŝtonetoj kontraŭ la karoserion portas ŝanĝon en la ofte iom monotonan kanton de tralanda veturo. Se la suno favoras nin kaj ni iomete malfermis la ŝoveblan tegmenton de nia aŭto, certe ankaŭ la veturvento kunkantas sian melodion, kaj se la pluvo estas nia vojaĝa akompananto, la takton de la unutoneco destinas la regula glitado de la vitrajviŝiloj kiel metronomo por la ĉefa motivo: "Antaŭen, plu! Kilometron post kilometro." Sed ne sufiĉas, "manĝegi" la kilometrojn, preni la matenmanĝon en loko A. ("tuj ankoraŭ antaŭ la benzinprenado"), poste en vilaĝo B. survoje "rapide malgrandan tason da bruna kafo", kaj poste fari "viziteton" al la antikva gotika preĝejo.

Estas multe pli grave, eble malpli koni la bonegan kazean kukon ĉe la gastejo en Vorderbach, ol prefere akcepti en si la grandiozan travivaĵon de alpa panoramo, kiu sin prezentas jen de la Vorderbach-a strat-kurbigo supre en la arbaro. Kaj se oni fakte faras komfortan ripozon en gastejo — kaj tion faras pro tio, ĉar speciala domsimbolo aŭ kurioza nomo instigis elekti tiun gastaman domon en Aŭstrio —, oni trankvile povas ankaŭ foje rigardi en la korton de la domo aŭ per la fotilo ek de najbara domo fiksi tian idilion el ŝtono, stuko kaj forĝita fero por la serio de belaj feriaj fotoj.

Kiel gasto en la "Malnova Poŝto"

Tre multnombraj estas tiaj domoj de gasta ripozo en Aŭstrio; por tute precizaj legantoj ni eldiru: estas ĉirkaŭ 13.000 domoj, en kiuj ĉiunokte inter Bregenz-a Lago kaj Neusiedl-a Lago proksimume 280.000 homoj post bela vojaĝa tago tra Aŭstrio aŭ post tago plena de specialaj feriaj ĝojoj povas trankvile dormi. La gastigan tegmenton ni trovas same sur la Bieler-altaĵo situanta pli ol 2.000 metrojn alta apud la malsupro de la Silvretta-glaciejoj kiel duonvoje al la Radstädter Tauern aŭ ekzemple en la proksimeco de la Lainz-a zoologia ĝardeno en Vieno, kie iama ĉaskasteleto povas aflustri al siaj vesperaj gastoj la verajn "Historiojn el la Viena Arbaro".

En Graz, la tiel multvizaĝa, pramalnova urbo ĉe la rivero Mur, povas esti la fama Krebsenkeller (Kankra Kelo) en la Sack-strato kun sia belega forĝite fera arkitekturo aŭ la Kepler-Kelo en la Stempfer-strateto, kiuj prezentas tiajn menciitajn fotomotivojn. Unu el la plej belaj kortoj inter la gastigaj domoj en

Aŭstrio certe estas ankoraŭ ĉiam la "Alte Post" (Malnova Poŝto) en Krems. Kia nobleco de tiuj arkaĵoj devenantaj ankoraŭ el la gotika epoko, kia komforta ripozado en la kvietaj ĉambroj, kies pordegoj laŭ antikva maniero artece ferumitaj gvidas al la sunplena pintarka koridoro, super kiu delikate moviĝas la silento.

Aŭ kiel bongustas en Innsbruck en panelita ĉambro, ie en iu el la stratetoj de la antikva urbo, la trankvile gustumita "Achtele Rötel" (okonlitro da ruĝvino) — kompreneble, se oni tiun vesperon ne plu daŭrigas la veturon! Valora lignoskulptaĵo el la jaro 1500 aŭ ekzemple la scio, ke ĉe tiu tablo sidis la juna sinjoro von Goethe, kiam li dum sia vojaĝo al Italio ripozis en Innsbruck — ha, estas sufiĉe multaj surprizoj, kiuj estas troveblaj survoje en Aŭstrio apud la jam per si mem tiel multkolora bildlibro de la frontvitraĵo...

Sur antikvaj romanaj stratoj

"Sinjoro mastro, portu al ni nur de la plej bona! Tiel ni kutimas ĉe niaj festoj!" Ĉu ne sonas gaja trinkanto-horo je liuta ludado kaj hela knabinridado el kelka tia malnova gastejo, kiam ni tie ĉi kaj tie dum nia veturo rigardas tra kortaj pordegoj kaj portaloj, malantaŭ kiuj atendis nin tiom da ŝtona beleco? "Vorarlberger Käsepatzle" (fromaĝaj buloj) nur ĝuste bongustas laŭ ĉiuj artoj de la alemana kuirsperto, kiam ni manĝas ilin eble en Dornbirn en la tiel fama "Ruĝa Domo" aŭ supre ĉe la verda rivero Lech ĉe la malsupro de la alten leviĝanta Omeshorn en tia praantikva ripozejo kaj gastloko.

Penseme ni foliumas en nia turista libro: Kie, kie do ni havis nur antaŭ nelonge tian renkonton apud la bildlibro, kiun la frontvitraĵo montris al ni ankaŭ meze en la aŭstria alpoj? Jen estas notite: Untertauern nomiĝas la malgranda loko!

Ek de Radstadt ĉi tie la granda ŝoseo venas trans la Tauern, ĉi tie komencas altiĝi iom post iom, kaj poste oni pluiras sur la sama linio de la strato, sur kiu jam romanaj legionanoj de imperiestro Septimius Severus prenis sian vojon en la landon de la taŭriskoj, tra Obertauern, Tweng kaj Mauterndorf tra la Salzburg-a Lungaŭ al la Katschberg.

Romanaj stratoj, romanaj pontoj, romanaj ŝtonoj — sendube: Ili konstruis por multaj jarcentoj, tiuj unuaj grandaj stratkonstruantoj en Aŭstrio. Dum nia veturo de la Neumarkt-a montpasejo suden en la Klagenfurt-an rondvalon en Maria Saal ni admiris la faman reliefon kun la prezentaĵo de ruliĝanta

romana vojaĝa veturilo. Sed poste — denove apud nia frontvitraĝa bildlibro — ni staris en Klagenfurt mem en tiu admirinda parka muzeo, en kiu tiom multaj aliaj romanaj ŝtonoj rakontas al ni pri la vivo de tiuj tempo.

Kia strato estas tiu de la Karintia lando supren trans la Glockner al Salzburg-o! Ne, kaj kiom ajn urĝas eble la tempo, kiom ajn rapide moviĝas la veturilaj kolonoj kaj bruas la motoroj "rapidu, rapidu!" — ĝuste sur tiu strato ni devas kiel eble plej ofte rigardi en la miloblan vizaĝon de Aŭstrialando. De Velden ni venis, Spittal ni preterpasis, kaj ni daŭrigas la vojon tra la Möll-valo. Haltu! Ne malproksime de la Möll-ponto malgranda preĝejo, loketo aspektanta tiel, kiel ĝi ankaŭ nomiĝas: St. Peter im Holz (S-ta Petro en la ligno)! Ni do lasu al aliaj la bildlibron de la frontvitraĝo, kies folioj estas ĉiam ree tiel rapide turnataj, kaj rigardu tie en St. Peter la juvelon, kiu sub la nomo "Teurnia" estas vaste konata en la arthistorio. Zorge protektitaj kontraŭ la malmildaĵoj de la vetero, tie montriĝas valoraj trovaĵoj, inter ili la fama mozaika planko de la plej malnova frukristana eklezia kaj urba loĝloko en Aŭstrio.

Kie estas plej bele laŭ pejzaĝa grandiozece apud la bildlibro de la frontvitraĝo? Ni vidis la karintiajn lagojn, ni vidis eĉ meze inter kamentuboj kaj industrihaloj, en Wiener Neustadt en la tagmeza suno, la grandiozecon de la alpoj salutantan kun la konturoj de Rax kaj Schneeberg (Neĝmonto). En nia veturlibro estas notita la Arlberg aŭ la rigardo de Patscherkofel al Innsbruck. Sed jen ni fiksis per la fotilo ankaŭ pecon de la naturo, la belegan akvofalon ĉe la Glockner-strato.

Estas bona land'

Tiom multon ni notis en tiu land' de l' montoj, kiu ankaŭ estas land' Danuba, kiel ĝin diras la Nacia Himno de Aŭstrio en la intima hejmlanda sento de sia lingvo. La akvofalo ĉe la Glockner-strato vere ŝajnis al ni kiel la sintezo de monto kaj riverego. Kaj kiam ni poste venis en la urbon Salzburg mem, dum neforgesebla vespero travivis la teatraĵon pri vivo kaj mortado de la riĉa sinjoro Jedermann, ni konsciigis pri la senco de la dua parto de la unua strofo de la Himno: "Land' de katedraloj..." Unu el la plej belaj urboj dum tuta posttagmezo tenis nin admirantaj en la ravo de siaj grandeco kaj beleco. Ĝi igis nin ekkoni, same kiel tiu ludo antaŭ la katedralo aŭ vespero plena de solena muziko de la Salzburg-a geniulo Mozart, ke ni havas la rajton, en nia Himno plue proklami: "Hejm" de filoj eminentaj, de loĝantoj por bel' sentaj!"

Tamen ankaŭ por la ĝuo de la rigardado kaj sentado kelkfoje validas la sama ora regulo kiel ĉe bonega manĝaĵo kaj nobla trinkaĵo: Oni ĉesu, kiam gustas plej bone! Ĉar nur tiel la florkrono de la ekrigarditaj bildoj apud la tintanta bildlibro de nia frontvitraĝo rondiĝas al la vera delikataĵo, kiel povas esti malofta libro. Tiel kiel tiu "bona land'" malfermis ĝin por ni komence de nia veturo, kiam ni de la kupolo ek de la tiel stranga montopreĝejo en Eisenstadt faris la fascinantan rigardon en la sunan Burgenlandon. La pejzaĝo, el kiu al la geniulo Joseph Haydn ĉe la komponado de sia oratorio "La sezonoj" eksonis la kanto de la radiantaj, lumantaj, benanta somero. Iom de tiu speco ĉiam estu ankaŭ la melodio, kiun vi povu elaŭdi el la zumado de via aŭto, kiam vi je tia somera tempo vojaĝas tra Aŭstrio...

NIA ENKETO

Kontakto demandis - vi respondis

Redakcio de revuo ankoraŭ pli multe ol tiu de ĵurnalo volas prezenti al siaj legantoj tion kion ili vere ŝatas. Ke ne estas facile trafi ilian guston kaj precipe la guston de la plimulto, tion ĉiu scias. Helpi povas enketo inter la legantoj mem. Do ankaŭ Kontakto, en la tria jaro de sia aperado, uzis tiun eblecon kaj dissendis kartojn kun precizaj demandoj. Jen la rezulto de tiu enketo, interesa ne nur por la redakcio, sed certe ankaŭ por vi.

Revenis entute 46 karto, kio ŝajnas malmulte, sed ne estas kiel mi scias el pli fruaj spertoj. Mi persone eĉ miris pri tiu "alta" nombro. Klare ke oni ne rajtas tro multe konkludi el tia enketo kaj forgesi ĝian relativecon.

Mirigi povas ke nur 6 legantinoj respondis. Ankaŭ la aĝo pensigas:

neniu sub 16-jara, dek-kvin 16-20, dudek-du 20-30-jaraj, ses pli ol 30-jaraj. Po unu respondinto estas 62-jara kaj 79-jara.

La profesioj estas laŭ niaj atendoj: 25 studentoj resp. studintoj, 11 oficistoj kaj dungitoj, 5 lernantoj, nur 2 laboristoj. La demandon pri la legata procentaĵo de unu nu-

mero respondis: 100 % deksek, 75 % dekkvar, 50 % ok, 25 % kvin. La plimulto ŝatas 3-5 bildpaĝojn (por 4 paĝoj pledis 12), sed estis ankaŭ kelkaj, kiuj postulis eĉ 8 bildpaĝojn.

La abonprezo de Kontakto superas konsiderinde samspecajn revuojn en naciaj lingvoj: nur tri respondintoj diris, ke en la koncerna lando tia revuo kostas pli multe.

Komparon kun La Praktiko nia revuo povas elteni: 13 asertis ke Kontakto estas pli bona, 7 inverse, dum la aliaj aŭ ne konas La Praktiko aŭ ne volas kompari ĝin pro principaj konsideroj.

La plej interesa demando kompreneble estis tiu pri la artikoloj. Ni demandis: "Kiu artikolo(et)oj en Kontakto plej plaĉis al vi?" kaj

Letero de la Luno

Karaj homoj,

pardonu ke mi rompas mian longan silentadon. Se ŝajne estas urĝa tempo ke mi parolu al vi antaŭ ol vi definitive venos sur mian korpon. Ĉar ne pensu ke estas indiferece al mi malvarma luno, kiam vi diskutas pri mi, pri la solvado de miaj misteroj, pri la ekloĝo sur mi, pri la totala konkero de miaj pejzaĝoj...


Ja, pli frue estis tute alie. Certe, vi terhomoj ĉiam okupiĝis pri mi. Kaj kiajn diferencajn imagojn vi do havis pri mi! Miaj nomoj ĉe vi vere konfuzis min ofte. Por ĉinoj kaj hindoj mi estis leporo, ĉe la babilonanoj ĉionpova dio. Aliaj asertis ke mi estas vivĝuema virino. La grekoj vidis min kiel honeste ĉastan virgulinon kun nomo Selene. Kio kaj kiu mi do vere estas...?

Mian aĝon mi taksas je 8 miliardoj de jaroj. Sufiĉe multe, ĉu? Brave mi reguligas miajn tajdojn, kiel estas mia ofico; kiam mi estis pli juna, mi reguligis ankaŭ vian kalendaron, sed tiu feliĉa tempo pasis.

Sed mia plej bela kaj kara tasko estas plibeligi la kunestadon de Joĉjo kaj Manjo, kiam ili amreve kunsidas en mia milda lumo sur kaŝita benko. Tiam ili konstruas lunkastelojn en siaj naivaj revadoj...

Sed nun estas fino de la revado. Rusoj kaj amerikanoj sendas rakecojn al mi kaj jam malmilde trafis mian vizaĝon.

Nu, mi jam estas scivola, kiel plaĉos al vi ĉe mi. Sed komprenu ke mi devos saluti vin sufiĉe froste, estas mia maniero. Komforton mi ne havos por vi, ĝin vi devos mem alporti.



Unu el miaj kordeziroj: Pleje mi ŝatus akcepti miksititan teamon de rusoj kaj amerikanoj, por ke neniu el ambaŭ povu aserti, kiu havas "generalon luno" tiu povas treti la teron. Mi ja ne estas Marso, sed pacama dum mi vivas. Militon do lasu sur via tero, aŭ pli bone: tute lasu ĝin!

Via Luno

donis tri "rangojn". En la suba listo la unua nombro indikas la oftecon de la mencio, la dua nombro, kiom ofte ĝi estas indikita unualoke.

Revolucio per amo 16 / 6

Malsato 12 / 4

Niaj humoristoj 11 / 4

Du knaboj 9 / 5

Lukto por paco 9 / 1

La homaj rajtoj kaj lingva diskriminacio 8 / 2

Afrika tribestro 7 / 4

Koreaj studentoj pri amo 5 / 1

Analizante tiun rezulton ni povas certe konstati unu tendencon: se-

riozaj artikoloj pri seriozaj, gravaj mondaj problemoj estas plej ŝatataj." Niaj humoristoj" ŝajnas escepto, sed ne estas, ĉar ja temas pri serio.

Aldone: la kartoj venis el 20 diversaj landoj kaj ĉiuj kontinentoj. Krome jen kelkaj interesaj rimarkoj ekster la kadro de la demandoj:

"Aperigu multe pli modernajn kaj allogajn artikolojn!" (Saĝa konsilo, ĉu ne?)

"Mi sentas, ke Kontakto kelkfoje emas tro emfazi eksterajn movadojn kun kiuj esperantisto rajtas konsenti aŭ ne konsenti, kaj mi pli ŝatas legi pri "nemovadaj" aferoj." (Ni opinias bone fari unu kaj ne lasi la alian.)

"La artikoloj konvenas nur por junuloj kandidatoj por la esperanto-akademio aŭ por sciencistoj."

Sed: "Prefere Kontakto ne fariĝu "dekumula magazino". Eble ĝi iom pli batalemu ol nun, ja."

Kaj: "Iusence ambaŭ estas stultaj kaj nenecesaj" (pri Kontakto kaj La Praktiko).

Ĉu ni do sekvu jenan konsilon: "Kontakto estu parto de la revuo Esperanto"? Al tio kontraŭdiras: "Oni ne presigu en ĉiu numero informojn pri la landaj sekcioj." Kaj alia konsilas: "Devas esti redakta komitato kiu havas sidejon en Eŭropo." Sed ĉi-sekvan konsilon ni nepre akceptas: "Atentu la komojn!"

sm

MOZAIKO

La mondo dormas

Ni devas vekti la mondon el ĝia dormo, eĉ se ĝi faras ĉion por fermi okulojn kaj stopi orelojn. Ne estas "bonsocie" paroli pri milito kaj mallibereco. Tio estas komprenebla; la homoj estas laĉaj. Sed ili ne trovas kvieton, se ili preterrigardas la problemojn. Se la popoloj restas pasivaj, ĉio kruela, kion ili travivis, ripetigos. Ni volas gvidi la homojn al ilia vera destino; ne per potenco, perforto, tiraneco kaj milito, sed per tio kio florigas la plantojn kaj maturigas la fruktojn.

Vercors



Cu vi scias....

...ke la moviteco de la mondmaroj eĉ ĉe ŝtormegoj ne estas pli profunda ol 50 m? Pli sube la akvamasoj estas preskaŭ senmovaj.

... ke la plej granda preĝejo orgeno de la mondo troviĝas en la katedralo de Passau ĉe la Danubo (Germanio)? Ĝi havas 17.000 fajfilojn, el kiuj la plej longa estas 11,5 m kaj la plej mallonga nur 4 cm.

... ke abelo devus viziti pli ol 7 milionojn da trifoli-floroj por kolekti unu kilogramon da sukero? Ĉe akaci-floroj sufiĉus 5 milionoj.

... ke Novjorko ne estas urbo el nur ŝtalo, ŝtono kaj betono? Preskaŭ la duono de ĉiuj konstruaĵoj estas el ligno!

... ke en Germanio ankoraŭ ĉirkaŭ la jaro 1800 staris 22.000 funkciaj ventmueliloj? En Ruslando ankoraŭ en la jaro 1914 ekzistis 250.000 ventmueliloj, kiuj muelis preskaŭ la duonon de la landa gren-rikolto.

La vanteco

En la tradicio-konscia Britio estas kutimo, nomigi 12 predikistojn, kiuj predikas al la parlamentanoj kiam ili kolektiĝas en Westminster. Ankaŭ d-ro Swift estis inter tiuj predikistoj kaj kiel tia li foje parolis pri la vanteco.

Li klarigis ke ĉefe estas kvar punktoj, pri kiuj fieras homoj:

1. naskiĝa stato
2. bonhavaĵoj
3. figuro kaj aspekto
4. inteligenteco

Traktinte en sia prediko la tri unuajn, li diris: "Ni nun venas al la kvara punkto. Sed ĉar inter vi estas neniu, kiu povus fieri pri la avantaĝoj de sia intelekto, estus superflue, karaĵ, eniĝi vin per tiu punkto. Mi finas mian predikon." D-ro Swift estis maldungita...



Gasto mem kuiras

En Novjorko oni malfermis "restoracion de l' estonteco". En ĝi la gasto ne nur ne estas priservata de kelnero, sed eĉ mem kuiras sian manĝaĵon. Sur karto kiu montras en koloraj bildoj la diversajn manĝaĵojn, la gasto serĉas menuon. Ĉe la bufedo li ricevas teleron kovritan per nediafana plasto. Sub ĝi troviĝas la frostita manĝaĵo. La gasto pagas, iras al sia tablo, kie staras mikronda forneto. Li ŝovas la teleron en la kuirilon kaj post kelkaj minutoj eklumas lampeto, signante tiel la kuiritecon. Nu, bonan apetiton!

Garaĝo serĉata

Dum ekspozicio multaj aŭtomobilistoj volis, pro malbona vetero, starigi siajn vehiklojn en garaĝoj. Al garaĝo-luanto venis 17 aŭtistoj, sed nur 16 garaĝoj estis liberaj. Sed la luanto sciis solvon de la dilemo. Al la unua aŭto li donis garaĝon I, al la dua aŭto garaĝon II, sed la trian aŭton li starigis antaŭ

garaĝo II; al la kvara aŭto li donis garaĝon III, al la kvina garaĝon IV ktp., tiel ke la deksepa aŭto staris en garaĝo XV kaj fine la deksepa aŭto, kiu ja staris antaŭ garaĝo II, povis veturi en la deksepan garaĝon. Ĉu ne inteligenta solvo? Aŭ eble tamen eraro?

(Kompreneble eraro, ĉar la tria aŭto antaŭ garaĝo II ne estis la deksepa aŭto, kiu ankoraŭ staras sub libera ĉielo.)

"Se knabo estus mi" sopirkantas Anni Peñloff. Kiel vi pensas pri ĉi tiu deziro? Skribu al ni!



BILDO + SONO = DOUBLA ĜOJO

La epoko de la "laterna magica" jam longe pasis. Hodiaŭ la en belegaj koloraj radiantaj diapozitivaj revivigas la harmonion de la viditaĵoj eĉ ankoraŭ post jaroj. Kaj ek de tiam, kiam ekzistas magnetofonoj tiel facile manipuleblaj kun la riĉaj eblecoj de la registrad-variado, ambaŭ — la diapozitivo kaj la sono — jam longe vivas en feliĉa geedzeco. La duobla ĝojo pri bildo kaj sono neniel postulas duoblajn kostojn.

Diapozitiv-direktilo aŭtomata, kroma sonkapo instalita en la magnetofono aŭ eĉ mikspupitro certe estas bonvenaj akcesoraĵoj; ili ankaŭ povas teknike perfektigi la diapozitiv-sonigadon kaj la postan prezentadon kaj per tio ĝin fari impresoplena. Sed simpla hejmmagnetofono (kaj mikrofono por la komenco tute sufiĉas. Sed nepre necesas vico de bonaj ideoj, iom da pacienca kaj multe da ĝojo pri la hobbio — pli bone: pri ambaŭ hobbioj, la diapozitivo kaj la sono —, por kapti tion sur la bendon, kio kompletigu akustike la bildon.

Oni komencas per simpla komentario por ĉiu bildo. Jen tuj konsilo por la praktiko: neniam oni diru ion, kion oni povas klare ekkoni sur la bildo pro si mem! Tre rapide oni venas al la konkludo ke la bildo pliviveciĝas, se oni miksas en la parolatan tekston ankaŭ muzikon kaj diversajn bruojn. Speciala arkivo de bruoj ne tuj estas necesa, ĉar kelkspecajn oni mem povas produkti per simplaj rimedoj. Ekzemple la kornsonon de vaporŝipo: oni blovas, metante al la rando de la malsupra lipo la buŝon de botelo parte plenigita per akvo; aŭ pluvo: oni movigas sur kribrilo kun densaj maŝoj manplendon da pizoj; aŭ plaŭdado de ondoj: per la mano malforte movigu akvon en pelvo el plastiko.

Tion aŭ tion oni povas originale kapti per la sonbendo, se oni ekzemple kunprenas la magnetofonon dum la ferioj kaj vojaĝoj. Por specialaj bruoj zorgas bruodiskoj aŭ bruo-sonbendo aĉeteblaj. Ankoraŭ konsilo por la praktiko: serĉu taŭgajn objektojn por foti ne nur per la okuloj, sed ankaŭ uzu la orelojn por aŭdi tion, kio por la posta dia-sonigado estas "aŭdinda" por la mikrofono! Rapide notu gvidvorton — "veturanta trajno" aŭ simile —, por kapti la bruon tie, kie oni ĝin trovas. Oni tute ne devas esti malnova "sonbendfakulo" por sukcesi en tiu rilato. Oni povas komenci tute malkomplike — kune kun la kreskanta ĝojo pro la propre faritaj sonigadoj ankaŭ venas aŭtomate la plirafinado.

Sed nun estas tempo por transiri al la praktiko!

Ni komencu ĉe la priskribo de diversaj

eblecoj sonigadi diapozitivojn kun la plej simpla:

I. La sonigado de la komentario — bildoŝanĝo per la mano

1. Fiksado de la diapozitiv-sinsekvo

Oni ne prezentu tro multe dum unu fojo. Ĉe tricifera nombro de bildoj ankaŭ bonvola rigardanto fariĝos trostreĉita. Oni evitu la ripetadon de motivoj, se ili ne estas nepre necesaj pro specialaj kialoj. Agordu la bildojn laŭ la kolornuancoj por eviti ĝenajn kolorsaltojn. Rekomendinda estas la forigo de neĝuste eksponitaj bildoj, ĉar ili povas malutili al la ĝenerala efiko. Ĉe la elekto de la bildoj oni laŭeble sekvu "ruĝan fadenon" ekzemple per klare ekkonebla tempa sinsekvo aŭ per bildogrupoj, kiuj estas ligitaj al sama temaro. Maldensigo de la serio eblas per harmonia alternado inter "totalo", proksim- kaj grandfotaĵoj.

2. Verkado de "scenlibro"

Laŭ la "ruĝa fadeno" fiksi la komentario laŭvorte kaj zorgeme redaktu ĝin. La prezentadaŭro de la bildo dependas de la longeco de la teksto. Nur escepte startu la tekston tuj post apero de la bildo. Pli rekomendinda estas atendado dum du ĝis tri sekundoj inter bildapero kaj tekstokomenco, por ke la bildo unue havu optikan efikon. Ne tro ofte oni uzu komunajn komentariojn alineon por du aŭ eĉ pli da diapozitivaj. Evitu monotonecajn memkompreneblaĵojn kiel ekzemple "Kaj ĉi tie ni vidas..." aŭ "Tiam ni venis al...". La bezonata tempo por paroli jam nun devas esti determinata laŭ laŭtvoĉa legado kaj horloĝo. Oni notu ĝin en la "scenlibro". Neforgesenda estas la du ĝis tri sekundoj, kiujn oni bezonas por la bildoŝanĝado.

3. Markado de la sonbendo

La komencon de la intencita sonkaptajo oni marku per mallarĝa peceto de blanka glubendo, kiun oni gluu sur la dorsflankon de la sonbendo.

4. Sonigado

Post instalado de la mikrofono kaj ŝaltado de la magnetofono al "kaptajo"

oni startu la bendon kaj komencu la paroladon. Bildoŝanĝon oni marku kiel akustikan signalon por la prezentado en la pli poste malhela ĉambro per diskretaj frapsignoj (eble per mallaŭta tintado de vinglaso). Capitrone post ĉapitro de la teksto oni tiamaniere registru. Ĉe pluraj bildoj dum unu sama tekstalineo oni laŭeble rezignu pri ŝanĝosignaloj, ĉar ili povas ĝeni. Pli bone oni fidu al la propra kono de la dia-sinsekvo kaj ŝanĝu la bildojn sen speciala signalo.

Per tio la bendo estas preta por la unua prezentado.

Tiel oni miksas:

Por la plej multaj "sonigadanoj" plimalpli frue venas la momento, post kiu nura komentario ne plu kontentigas ilin. Kun la diapozitivaj ankaŭ harmonias muziko kaj bruoj. Antaŭ ol ni pritraktu la sekvantajn sonigadprocedojn, ankoraŭ kelkaj informoj pri la miksadtekniko:

Akustika mikسادo


Samtempe kun la teksto la mikrofono ankaŭ kaptas ĉiujn aliajn bruojn. Sekve la unuopaj, tre diversspecaj sonondokontingentoj miksiĝas sur akustika vojo.

Certa malavantaĝo estas, ke akustikaj influoj de la ejo — ekzemple la eĥoj refleksigitaj de la ĉambromuroj — iom aliigas la sonon de la originaj bruoj kaptendaj per la mikrofono. Sed por la kaptado ekzistas en pli alta grado ankaŭ la danĝero de ĝenoj: ĉiu neatendita telefon-sonorilado, ĉiu hazarda pordoklakado en la loĝejo ktp. estas ankaŭ registrataj sur la bendo.

Magneta mikسادo

La artifikkalvo, per kiu oni povas rezultigi molajn transirojn, malfunkciigas la forigokapon. Per tio eblas registri du aŭ eĉ pli da kaptajoj sur la sama

trako de la bendo kaj tiel samtempe miksi ilin sen forigado de la antaŭe faritaj registraĵoj. Efektive okazas per tiu ĉi procedo malfortiĝo de la altaj frekvencoj. Ĉe la lokoj, kie oni volas labori per la artifikklavo, oni do iom pli forte faru la unuan registraĵon. Ĉe magnetofonoj ne ekipitaj per artifikklavo oni povas improvizi metante inter forigokapo kaj bendo mallarĝan kartonstrion aŭ strieton el plastiko post la unua registrado.



Elektra miksado

La plej bonan mikseblecon de divers-specaj sonondkontingentoj havas mikspupitro. Ĉiujn sonojn oni povas samtempe elektrike kunmeti, tute egale ĉu ili venas de mikrofono aŭ de dua magnetofono. La laŭteproporcioj oni povas komforte kontroli dum la registrado per orelaŭskultilo aŭ laŭtparolilo.

Per la unuopaj reguliloj de la mikspupitro oni povas laŭvole kaj precize laŭ deziro dozi la unuopajn sonondkontingentojn unu kontraŭ la alian.

Paraleltraka miksado

Ĉi tiu procedo ebligas la apartigitan registradon de du son-okazaĵoj sur du en la saman direkton kurantaj trakojn ĉe magnetofonoj ekipitaj por stereofoniaj kaj "playback"-registraĵoj.

Normale la registraĵoj okazas en sinsekvo: unue oni registras la komenton sur unu trako, en dua procedo sekvas ekzemple la bruoj sur la paraleltrako. Magnetofonoj kun playback-ekipaĵo ebligas la aŭskultadon de unu el la du trakoj dum la registrado de la alia, kaj per tio oni povas atingi sinronecon de ambaŭ registraĵoj. Ĉe la prezentado ambaŭ sonkapsistemoj helpe de komutilo instalita en la magnetofono estas ligataj tiel ke ambaŭ trakoj kaj per tio ambaŭ registraĵoj estas komune aŭdeblaj.

Aparta avantaĝo de la paraleltraka miksado estas la fakto, ke oni ne devas ripeti la unuan registraĵon ĉe korektoj necesaj de la dua aŭ inverse. Priatentende estas, ke dum la registrado de ambaŭ trakoj la laŭteco anticipe estas reguligata laŭ la pli poste dezirata miksporcio.

4. Sonigado

Ĉapitron post ĉapitro oni sonigadu laŭ la elektita mikspcedo. Ĉe la magneta miksado la enŝovaĵoj kiel bruoj ktp. laŭeble estu farataj unue, ĉar dum tiu ĉi procedo la unua registraĵo perdas iom de la laŭteco per la dua. Laŭ la "scenlibro" oni serĉu la koncernajn poziciojn sur la markita sonbendo kaj laŭ la tempoplano oni registru la intencitajn enŝovaĵojn, aŭ per la mikrofono aŭ per dua magnetofono.

Post la registrado de la "fono" oni premu la artifikklavon kaj registru la tekston. Plej rekomendinde estas lasi la klavon enŝaltita de la komenco. Tio garantias konstantan laŭtfortecon de la registraĵo ĝis la fino. Samtempe oni kaptu diskretajn akustikajn signalojn por la bildoŝanĝo. Sed ankaŭ ĉi-kaze laŭeble evitu tiujn ĉi signalojn, se du aŭ pli da diapozitivaj havas komunan komenton.

Preta por la prezentado!

II. Komentario + bruo Bildoŝanĝo per la mano

Ĉe la unuopaj punktoj de tiu ĉi procedo nur tio estas kompletigita, kio antaŭe sub la samaj punktoj ankoraŭ ne estas menciita.

1. Fiksado de la diapozitiv-sinsekvo

2. Verkado de "scenlibro"


La unuopajn paĝojn oni dividu en du vertikalajn partojn: maldekstre oni indiku la numerojn de la bildoj kaj la planitajn enŝovaĵojn kiel bruoj, teknikaj notoj (mola transiro, mallaŭtigado ĉe certaj tekstlokoj k.s.), haltodaŭro de la bildo ktp.; dekstre la tekston destinitan por ĉiu unuopa bildo.

poste estos la komenco kaj la fino de la tekstoregistraĵo; dum tio ankoraŭ ne okazas registrado.

H. Staudt

3. Optika markado de la sonbendo

Oni fiksu markon el glubendo por la pozicio "starto" de la sonbendo. Sammaniere pliaj markadoj tie, kie pli



Perantoj de KONTAKTO

Argentino: s-ro J. C. Milkuschutz, Sarmiento 3298, OLIVOS (330 pesoj)
Aŭstralio: s-ro K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield S.E. 8, MELBOURNE, Vic.
Aŭstrio: s-ro F. W. Rentmeister, A 1150 WIEN XV/101, Kauersgasse 1/1 St. 2, Stg. 15 (58,— Sch.)
Belgio: s-ro François Schellekens, Frans Hensstraat 44 c-10-3, ANTWERPEN (115 b.fr.)
Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República 54-II, RIO DE JANEIRO (3400 kruz.)
Britio: Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Ave., LONDON, W.11 (16/— ŝil.)
Bulgario: s-ro Simeon Simeonov, G. Genov 22, SOFIA-C (2,— lv.)
Ĉeĥoslovakio: s-ro Egon Moravec, U družstva Ideál 11, PRAHA 4-Pankrác (32 Kčs)
Danlando: s-ro Søren Andresen, Friggsvvej 10 st.tv., FREDERICIA (15,50 d.kr.)
Finlando: s-ro Joel Vilkki, SOMERO (7,10 f.mk.)
Francio: Unuiĝo Franca por Esperanto, 34 rue de Chabrol, PARIS 10 (11 NF)

Germanio (FRG): s-ro Reinhard Hauptenthal, 6603 SULZBACH 1, Am Bahndamm 12 (8,90 g.mk.)
Germanio (GDR): s-ro Hans Eichhorn, 83 PIRNA, Großsedlitzer Str. 54 (8,90 MDN)
Greklando: s-ro S. Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Kato Patissia, ATHINE (66 dr)
Hispanio: s-ro R. Molera, Sta Joaquina de Vedruna 13, MOYA, Barcelona (135 pes.)
Hungario: Hungara Esperanto-Junularo, Kenyérmező u. 6, BUDAPEST VIII (52,— ft.)
Irlando: s-ro J. Addis, Kingstone House, Ballinteer, DUBLIN 14 (16/— ŝil.)
Islando: Federacio de Islandaj Esperantistoj, Pósthólf 1081, REYKJAVIK (93,— i.kr.)
Israelo: s-ro J. Ben Alter, P.O.B. 379, PETAH TIKVA (6,70 isr.pd.)
Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1400 lr.)
Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Hongo 2-2-14, Bunkyō-ku, TOKIO (800 enoj)
Jugoslavio: s-ino Emilja Lapenna,

Nova Ves 32/III, ZAGREB (2000 din.)
Kanado: s-ro W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., TORONTO 7, Ont. (2,40 dol.)
Kongo: Konga Esperanto-Instituto, B.P. 7579, LÉOPOLDVILLE
Koreo Suda: s-ro Taekeng Kim, 104-43 An Am-dong, SEOUL
Madagaskaro: s-ro Eugène Raveloson, B.P. 1678, TANANARIVE (300 f.mg.)
Maroko: s-ro René Cagnon, 19 rue Pierre Parent, RABAT (11 DH)
Meksikio: s-ro F. Azorin, Str. Gualdalquivir 41-E, MEXICO 5 D.F. (28,— pesoj)
Nederlando: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM-2 (8,— gld.)
Norvegio: s-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn 118a, OSLO-Bryn (16,— n.kr.)
Novzelando: Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, P.O. Box 181, UPPER HUTT (16/— ŝil.)
Pollando: s-ro Marek W. Pietrzak, ul. Francuska 5a/3, WARSZAWA (55 zl.)
Portugallio: s-ro José Antunes, Rua dos Fanqueiros 106, 4 dto., LISBOA (64,— esk.)
Rumanio: s-ro Florin Carages, Popa Petre 28, BUCURESTI-9 (32 lejoj)
Sovetunio: s-ro A. E. Gončarov, p.k. 11, BARNAUL 99 (2,50 rbl.)
Sudafrika: s-ro Colin Beckford, P.O. Box 10516, JOHANNESBURG (1,60 rnd.)
Svedio: Sveda Esperanto-Federacio, Specialkonto, MALMÖ (11,50 s.kr.)
Svislando: s-ro Otto Walder, Waldmannstr. 10, 8590 ROMANS-HORN (9,70 s.fr.)
Urugvajo: d-ro R. Zeballos Morales, FRAY MARCOS (Florida) (50,— pesoj)
Usono: s-ro D. E. Parrish, 328 West 46 St., LOS ANGELES, Calif. 90037 (2,25 dol.)
Venezuelo: s-ro L. Moulines, Apartado del Este 4845, CARACAS (10,— bol.)

ESTRARO DE T.E.J.O.

Ivo Osibov, prezidanto, Splitskog odreda 15, Split, Jugoslavio
Carlo Minnaja, ĝenerala sekretario, Viale Giulio Cesare 223, Roma 6, Italio
Marek Pietrzak, vicprezidanto, ul. Francuska 5a/3, Warszawa
Humphrey Tonkin, vicprezidanto, 7 Linnaea Street, Cambridge 38, Mass., Usono
Ulrich Lins, kasisto, Gemarkenstr. 146, 5 Köln-Dellbrück, Germanio
Hans Bakker, eksteraj rilatoj, Kastelenstraat 231, Amsterdam Z., Nederlando
Yoshimi Umeda, agado en Azio kaj Oceanio, ĉe Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanio
Svobodan Zlatnar, kulturaj kaj lernejoj aferoj, Rimska 7, Ljubljana, Jugoslavio

LANDAJ SEKCIOJ DE T.E.J.O.

AŬSTRALIO:
Daniel Kane, 5/55 Hardwick Street, North Melbourne
AŬSTRIO:
Hans Michael Maitzen, Mozartgasse 4, Graz
BELGIO:
Roger van Humbeeck, Dambruggerstraat 296, Antwerpen
BRITIO:
2 Edwina Gardens, Ilford, Essex
BULGARIO:
p.k. 587, Sofia
FRANCIO:
JEFO, 34 rue de Chabrol, Paris X
GERMANIO:
Dieter Kleemann, Fritz-Kalle-Strasse 26, 62 Wiesbaden
HISPANIO:
Salvador Aragay, Arce 8-2-4, Cornella, Barcelona
HUNGARIO:
HEA, Petöfi Sándor u. 17, Budapest 5

ITALIO:
Via Po. 7, Torino
JAPANIO:
1-13 Motomachi, Bunkyo-ku, Tokio
JUGOSLAVIO:
Terazije 42, Beograd
KOREO:
Taekeng Kim, 104-43 An Am-dong, Seong-Puk, Seoul
MADAGASKARO:
B.P. 1678, Tananarive
NEDERLANDO:
Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z.
NORDAMERIKO:
Shell, 2535 Hillegass, Berkeley 4, Calif.
POLLANDO:
ul. Nowy Swiat 27, Warszawa
SVEDIO:
Ingrid Carlsson, Lindbergs. 4, Sundsvall
SVISLANDO:
Edwin Thomas, Bielstrasse 16, 3250 Lyss

MENDU ĈE U.E.A.

la broŝuron

LA ESPERANTO-SOCIETO

Elstaraj artikoloj de la estraranoj de UEA:

Ivo Lapenna

Günther Becker

E. L. M. Wensing

Maurice Jaumotte

represitaj el "Esperanto".

Abundaj konsiloj por ĉiuj grupaktivuloj —
pri informado, organizado, instruado kaj
distraĵoj.

Kun aldono de modela statuto de loka
grupo.

ĉ. 20 p., 22 x 17 cm.


Prezo: 1,50 gld. (6 st.)

POST LA 50-A UNIVERSALA KONGRESO

en la movado ekestis granda interesiĝo pri
Japanujo.

Mendu ĉi tiun luksan gvidilon tra la japana
vivo!

400 nomoj aŭ terminoj, tola bindaĵo kun
kartona skatolo, riĉa ilustrado. Prezo: 18 gld
(72 st). Sola vendraĵo ekster Japanujo:
U.E.A.




**Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de
Mihail Lermontov, la granda majstro de la
rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn
rakontojn en la traduko de D. Staritsky.**

Kun bibliografio
de Lermontovaj
verkoj en
Esperanto

Moderna plasta
kovrilo

Prezo: 5,- gld.
(20 steloj)



Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia
kaj senspirige poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin
kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj
kroĉiganta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.

"Reĝo Lear faras decidan antaŭpaŝon en la
kampo de la viva dramo."

A. D. Foote en British Esperantist

"La fideleco, al kiu la tradukinto celis, estas
plene atingita, kaj al tio nenio estas oferita el
la majesta poezio de la originalo."

D. B. Gregor en Heroldo

"Neniu franca traduko povas atingi la altan
gradon de ekzakteco trovebla ĉe la Kalocsay-a
traduko."

Robert Martin en Franca Esperantisto

"Kalocsay pruvis ankoraŭfoje sian majstrecon.
Mi havas la impreson, ke Reĝo Lear estas lia
atuto."

William Auld en la revuo Esperanto

REĜO LEAR

Tolbindita: 16,50 gld.

Broŝurita: 14,— gld.